JARO 2016 #1

ESPÉRANTO NORD
www.esperanto-nord.org

15 FEB 2016

# NORDA ☆ KURIERO

## Post la Gazeto, jen la Kuriero!

Nia federacia bulteno nomita *La Norda Gazeto* aperis unuafoje en 1908 kaj estis ricevata papere de ĉiuj federacianoj kaj abonantoj. Ni gratulas kaj varme dankas al ĝiaj ĉefredaktoroj kaj diversaj kontribuintoj pro ilia longdaŭra sindonemo.

Tamen la tempo ŝanĝiĝas, kaj nun la Federacio decidis transformi la Gazeton en novan, retpoŝtan informilon: la ***Norda Kuriero***. Jen ĝia unua numero!

Ĝi celas informi vin pri la vivo de la Nordfrancia Federacio kaj ĝiaj kluboj. Ĝi entenos ankaŭ viajn proprajn kontribuojn. Ni klopodas por reta eldono ĉiun duan monaton. Ĝi estu ligilo inter ĉiuj ni en norda Francio!

Nepre notu nian retadreson, al kiu vi sendu viajn komentojn kaj informojn (pri klubaj kunvenoj, kursoj, diversaj aranĝoj, ktp.):

**kuriero@esperanto-nord.org**

## La Federacia Komitato kunsidis

Sabaton la 17[an] de januaro 2016 kunsidis la Federacia Komitato de la Nordfrancia Esperanto-Federacio en Lambersart. Ĝin konsistigas 15 delegitoj el niaj ses membraj kluboj, kiuj kunvenas du aŭ tri foje ĉiujare. Jen kelkaj decidoj de la instanco:

**1) Federacia jarkunveno en 2016:**

La klubo Arras-Espéranto organizos la federacian jarkunvenon en **dimanĉo la 1[a] de majo**: matene okazos la jarkunveno; posttagmeze okazos vizito de la Libra Salono kun budo pri Esperanto. Tiam la membraro renovigos la tutan Federacian Komitaton, kiu tuj poste elektos novan Estraron.

**2) Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage:**

Roch Jullien organizos la venontan Eŭropan Rendevuon en Stella-Plage dum la **19[a] kaj 20[a] de novembro**. Ĉirkaŭ Roch ekstaris helpskipo el 7 membroj de Arras-Espéranto. Roch volas iom renovigi la aranĝon, ekzemple: ebligi partopreni ekster la atelieroj; komencigi la dimanĉan programon malpli frue; diversigi la dimanĉan posttagmezon cele al la komencantoj. La atelierojn gvidos



Katalin Kovats, Michel Dechy, Anne Jausions kaj Arlette Plutniak. Koncertos JoMo sabaton vespere.

**3) Ekzamensesioj:**

La Federacio organizos FEI-ekzamensesion kun la unua kaj dua gradoj en sabato la 18[a] aŭ la 25[a] de junio en Lillo (MRES). Ĝi ne organizos KER-ekzamensesion en 2016, Sed eble tia sesio povos okazi en la Eŭropa Rendevuo.

# Dancu tutmonde en Araso!



La klubo Arras-Espéranto invitas vin al tuttaga staĝo por danci tutmonde kun Roch Jullien **dimanĉon la 20an de majo**. La tago estos malfermita al ĉiuj komencantoj pri danco kaj pri la lingvo. Venu ankaŭ kun viaj familianoj kaj amikoj!

La staĝo okazos en la Kultura Oficejo de Araso (61 Grand-Place) ekde la 9:30 ĝis la 17:00, kaj kostos po 7 € por ĉiu partoprenanto (tiu kotizo ne inkluzivas la tagmanĝon). Surhavu komfortajn ŝuojn kaj malstriktajn vestaĵojn.

Informiĝu kaj aliĝu per la retpaĝo de la staĝo: **www.arras-esperanto.fr/dancu**

# Nova estraro por la Lilla klubo

Ĵaŭdon la 28an de januaro jarkunvenis la klubo Lille-Villeneuve-Espéranto. La membroj elektis novan estraron, kiu konsistas el:

- Xavier Dewidehem, prezidanto;
- Michel Dechy, vicprezidanto;
- Katja Boen, ĝenerala sekretariino;
- Dorine Francheteau, ĝenerala vicsekretariino;
- Richard Valet, kasisto;
- Pierre Dufour, vickasisto.



La klubo kunvenos:

- ĵaŭdon la 10an de marto je la 19:00 en Villeneuve-d'Ascq (FOS Tennis, 70 rue du Lt-Colpin);
- ĵaŭdon la 14an de aprilo je la 19:00 en Lillo (MRES, 23 rue Gosselet).

## BALDAŬAJ RENKONTIĜOJ

**Tago de la Flandraj Ardenoj:** la Kortrejka klubo invitas vin por dimanĉo la 24a de aprilo, kun matena promenado en la naturo (Zegelsem) kaj posttagmeza vizito de malnova hospitalo (Lessines).

**Landa kongreso de Espéranto-France:** ĝi okazos de la 5a ĝis la 8a de majo en Marsejlo. Pli da informoj ĉe: www.esperanto-france.org

## KOLOFONO

La ***Norda Kuriero*** estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio.

Redaktis: Katja Boen, Xavier Dewidehem.
Enpaĝigis: Xavier Dewidehem.

Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso: *kuriero@esperanto-nord.org*